



S-ro ANTONO LOPEZ VILLANUEVA
Normala Profesoro en Murcia—Vicprezidanto de
H. S. p. E.—Aŭtoro de Esperantaj lernolibroj.

LA SUNO HISPANA *

ENHAVO: 1. Dua Universala Kongreso en Genevo (programo).—2. Krimo plenumita sen la grandvalora kunhelpo del verbo.—3. Valencio, unua urbo de Hispanujo uzinta presadon.—4. Du fratoj.—5. Sciigoj.—6. Bibliografo.—7. La hino kiu reiris al sia patrujo.—8. Spritajoj.—9. Nia societo.—10. Korespondada fakto.—11. Niaj vizitantoj.—12. Anoncoj.

Al Gesinjoroj Zamenhof sendas la Redakcio de «La Suno Hispana» plej koran esprimon de sia kondolenco pro la morto de S-ro S. Silbernik, patro de Sinjorino Zamenhof.

SUB LA PREZIDO DE D^{RO} ZAMENHOF

DUA UNIVERSALA KONGRESO EN GENEVO

de la 28^a de Aŭgusto ĝis la 6^a de Septembro 1906

Unua cirkulero de la Loka Organiza Komitato

PROGRAMO DE L' KONGRESO

Mardon 28 Aŭgusto, vespere: Oficiala Malferma Ceremonio kaj Koncerto.
Merkredon 29, matene: Preparaj Kunvenoj; posttagmeze: 1^a Ĝenerala Kunveno; vespere: Teatra Vesperfesto.
Ĵaŭdon 30, Ŝipveturado sur la Lemana Lago, kun oficiala Festeno en Vevey (Festenkarto: 5 frankoj).
Vendredon 31, matene: 2^a ĝenerala Kunveno; posttagmeze: Akcepto ĉe l' Parko de S-roj Thudicum en «La Chatelaine»; vespere: balo.

Sabaton 1 Septembro: posttagmeze: 3^a ĝenerala Kunveno; vespere: Oficiala Ferma Ceremonio kaj Koncerto.

3, 4, 5 Septembro: Vojaĝo tra Svisujo: Genève, Montreaux-Oberland, Spiez, Interlaken, Murren, Berne, Geneve.

Verda karto (fr. 10). Oni de nun povas aĉeti la oficialan kongreskarton kiu kostas 10 frankojn kaj donas rajton senpage ĉeesti kaj voĉdoni en ĉiuj kunvenoj de la kongreso, partopreni je ĉiuj festoj (ankaŭ je la ŝipveturado sur la lago) ricevi ĉiujn necesajn dokumentojn por la diskutoj kaj laboroj de l' kongreso kaj la adresaron de l' kongresanoj.

Blanka karto (fr. 5). Ĉiu persono jam posedanta 10 frankan *verdan karton* havos rajton aĉeti por la anoj de sia familio unu, du, tri aŭ maksimume kvar blankajn kartojn, kiuj kostas fr. 5 kaj donas samajn rajtojn kiel la verdaj kartoj, esceptinte la rajton voĉdoni kaj ricevi dokumentojn kaj adresaron.

Ekspozicio.—Granda ekspozicio estos organizata, ĉiuj esperantistaj grupoj estas petataj sendi kiel eble plej multajn dokumentojn al la kongresa oficejo. Specialan cirkuleron petu la interesatoj.

Aliĝojn, monon, korespondataĵojn, k. t. p., unuvorte ĉion, kio koncernas la Kongreson oni sendu nur al la: *Kongresa Oficejo, 15 Quai de l' Ile, Geneve.*

Krimo plenumita sen la grandvalora kunhelpo de l' verbo

Bela nokto de somero
Kun ĉielo steloplena,
Blanka luno, vento freŝa.
Sola valo kaj rivero.
Nek en kreskajar' lacerto,
Nek unu bird'en l' arbaro,
Nek malforta dolĉa kanto;
Ĉie paco kaj silento.
Tie alte, plena lumo
Kaj malsupre ombro plena,
Apud river' musko verda,
Sur la musko granda kruco.
Apud kruco belulino,
Apud belulin' junvir',
Kune kun mano de li
La mano de l' amantino.

Ekĝemoj interrompitaj,
Mil ĉirkaŭpremoj, rigardoj,
Plilongigata kisado
Kaj frazoj enamigitaj.
—Dolĉa bono!—Mia amo!
—Anim' mia!—Miro mia!
—Unu kison!—Jes.—Alian!
—Alian!—Alian!—Centon!
—Morgaŭ la Karpion!—Jes.
—Kaj kiam ni ambaŭ tie...

Crímen perpetrado sin la valiosa cooperación del verbo

Hermosa noche de estío;
Estrellado firmamento;
Blanca luna; tenue viento;
Fresco valle; manso río.
Ni un lagarto en la maleza,
En los árboles ni un ave,
¡Ni un canto dulce y suave!
Todo silencio y tristeza.
Allá arriba, todo luz;
Aquí abajo, todo sombra;
Junto al río, verde alfombra;
Sobre la alfombra, una cruz.
Junto á la cruz, una bella;
Junto á la bella, un doncel;
Entre las dos manos de él
Una blanca mano de ella.
Suspiros entrecortados,
Mil abrazos, mil miradas,
Frasas muy enamoradas
Y besos muy prolongados.
—¡Mi cariño!—¡Dulce bien!
—¡Alma mía!—¡Mi embeleso!
—Un beso.—Sí.—Y otro beso.
—¡Y otro!—¡Y otro!—¡Y otro!—¡Y cien!
—Mañana al Carpio.—Verdad.
—Y ambos una vez allí...

—Vi mia!—Vi mia!—Tiel
 Senmorta feliĉegeco.
 —Kaj tiu hom'...?—Ne plu lia.
 —Via amo?—Tute via
 Kiel nur de vi la mia...
 —Ĉiam mia?—Ĉiam via.
 Atenta je sia honto
 Post la kruco maljunulo
 En unu mano pistolo
 Kaj en la zono ponardo.
 Unu man' sur unu brakon,
 Kolerero kaj krio granda,
 Eklumo, bruego pafa,
 Kaj ekbrilego de ŝtalo.
 —Perfiduloj!—Ĉiel' pia!
 —Konfesoj!—Dia... Justecoj!...
 Du korpoj poste, sur tero
 Kaj fine stare l' alia.
 Je la sekvanta tagiĝo
 La figento indignita,
 La ĝendarmoj kun juĝisto
 Kaj la krimul' arestita.

Tradukis libere ROMÁN AYZA.

—Tú mío.—Y tú mía.—Sí,
 Y eterna felicidad.
 —¿Y ese hombre?—No más suya.
 —¿Tu cariño?—Para ti
 Como el tuyo para mí.
 —¿Siempre mía?—Siempre tuya.
 Atento á su propio mal
 Tras la cruz un noble anciano,
 Una pistola en la mano
 Y al cinto agudo puñal.
 Un rugido airado y fiero,
 Una mano sobre un brazo;
 El fulgor de un fogonazo
 Y el reflejo de un acero.
 —¡Ah, traidores!—¡Justo Dios!
 —¡Confesión!—¡Piadoso cielo!...
 Dos bultos luego en el suelo
 Y otro en pie junto á los dos.
 A la mañana siguiente,
 Guardia civil, el juzgado,
 El populacho indignado
 Y en prisión el delincuente.

ESTREMERÁ.

Valencio, unua urbo de Hispanujo uzinta presadon.

Inter gloroj de Valencio, la bela ĉefurbo de hispana provinco tiel same nomata, estas unu tre aminda por literaturistoj; en Valencio oni enpresis, antaŭ ol en alia loko de Hispanujo, la unuan libron; en Valencio brilis unue la Guttenberg'a stelo, tia lumestaĵo, kiu poste transformiĝis en helan sunon de la intelekto, kaj lumigis la tutan mondton.

Oni scias, ke Lorenzo Coster en Harlem (jaro 1436^a) kaj Johano Faust en Maguncio estis la antaŭvidantoj de la presarto el kiu la dua publikigis maŝine libron titolitan «Alexandri Galli doctrinali» (jaro 1442^a); sed ĝis kiam Johano Guttenberg kaj Petro Schoeffer gravuris matricojn kaj fondis presmodelojn movajn, la elpenso ne estis ja efektivigata kaj pro tio ĉi oni konsideras Guttenberg'on kaj lian kompostaverkon «Psal-

Valencia, primera ciudad de España que usó la imprenta.

Entre las glorias de Valencia, la bella capital de la provincia española así llamada, hay una muy amable para los literatos; en Valencia se imprimió, antes que en otro lugar de España, el primer libro; en Valencia brilló primeramente la estrella de Guttenberg, aquel astro que debía transformarse en claro sol de la inteligencia é iluminar el mundo todo.

Es sabido que Lorenzo Coster en Harlem (año 1436) y Juan Faust en Maguncia fueron los precursores de la imprenta, publicándose por el segundo, mecánicamente, un libro titulado «Alexandri Galli doctrinali» (año 1442); pero hasta que Juan Guttenberg y Pedro Schoeffer grabaron matrices y fundieron tipos móviles, el invento no fué propiamente realizado, y por esto se considera á Guttenberg y á su obra tipográfica

morum Codex» (1457) kiel elmontrinto kaj elmontraĵo de la intelekta ilo, kiu nin okupas.

El Germanujo pasis la afero rapide al Malaltajlandoj, kie Johano de Westfalia kaj Teodoro Martrus publikigis libron pri moralo nomitan «Liber predicabilium»; kaj en Hispanujo, sub kies regado tiam troviĝis tiuj landoj, oni utiligis preskaŭ samtempe la presformon por eldoni originalan libron, poemon pri la Senmakula Enbrigo de la Virgulino, verkitan de 36 malsamaj poetoj, kies libro estis enpresata en Valencio dum la jaro 1474^a, antaŭa dato al aliaj konataj de libreldoj hispanaj.

Dum la sekvanta jaro, oni finis enpresi alian verkon tre ampleksan la «Comprehensorium» aŭ vortaron latinan en volumo kun 319 folioj kaj ĉiu el ili kun 164 linioj; kaj ĉar, kredeble, estas nedireblaj la malfacilaĵoj, kiuj prezentigis, komence, por efektiviĝi entreprenon de tia graveco, oni ne riskas supozante ke jam en 1472^a estis komencata la presfado de «Comprehensorium».

Seninterrompe oni publikigis verkojn de Krispo Salustio, tradukon de Biblio, en valencia dialekto, de Bonifacio Ferrer, frato de l' glora Sanktulo Vicencio, la kosmografion de Pomponio Mela, aranĝita de germano Lamberto Palmart kaj la faman eldonon de «Fueros del Reino de Valencia» (privilegiaj lokaj leĝoj).

Jen la surskribaĵo de la plataŝtono, kiu lokita sur la muro de domo, en la strato Valldigna, memorigas la okazintaĵojn:

«Al la enkondukantoj en Valencion de la civilizacia arto de la presado Ildefonso Fernandez de Córdoba kaj Lamberto Parmart, kiuj ĉe tiuj ĉi loko starigis la unuan presejon, kiu funkciadis en Hispanujo. La urbo Valencio je la solempo de la IV^a centjaro post ĝia starigo en nia lando. Jaro 1874.»

(Aranĝita laŭ verko «Guía urbana de Valencia» de markizo de Cruilles.)

«Psalmorum Codex» (1457) como el descubridor y el descubrimiento del instrumento intelectual que nos ocupa.

De Alemania pasó el asunto rápidamente a los Países Bajos, donde Juan de Westfalia y Teodoro Martrus publicaron un libro sobre moral denominado «Liber predicabilium»; y en España, bajo cuyo imperio se encontraban entonces aquellos países, se utilizó casi al mismo tiempo la imprenta para editar un libro original, un poema sobre la Inmaculada Concepción de la Virgen, escrito por 36 distintos poetas, cuyo libro fué impreso en Valencia en el año 1474, fecha anterior a las otras conocidas de ediciones españolas.

Durante el siguiente año se terminó de imprimir otra obra muy extensa, el «Comprehensorium» ó vocabulario latino, en un volumen con 319 hojas y cada una de ella con 164 líneas; y como es de creer que fuesen indecibles las dificultades que se ofrecerían al principio para realizar una empresa de esta importancia, no será arriesgado suponer que ya en el año 1472 estaba empezada la impresión del «Comprehensorium».

Sin interrupción se publicaron las obras de Crispo Salustio, la traducción de la Biblia al dialecto valenciano por Bonifacio Ferrer, hermano del célebre santo Vicente, la cosmografía de Pomponio Mela, arreglada por el alemán Lamberto Palmart, y la famosa edición de los «Fueros del Reino de Valencia».

He aquí la inscripción de la lápida que, colocada en la pared de una casa de la calle de Valldigna, conmemora el suceso:

«A los introductores en Valencia del arte civilizador de la imprenta, Alfonso Fernández de Córdoba y Lamberto Palmart, que en este sitio establecieron la primera prensa que funcionó en España, el municipio de Valencia al celebrarse el iv siglo de su establecimiento en nuestro país. Año 1874.»

(Arreglado de la obra «Guía urbana de Valencia», del marqués de Cruilles.)

Du fratoj

Jerusalemo estis kulturigita kampo: du fratoj posedis la kampan lokon kie hodiaŭ staras la templo (1): el ili unu estis edziĝinta kaj havis multajn gefilojn: la alia vivis izolite. Ambaŭ kulturigis kune la kampon kiun ili heredis el sia patrino.

Tuj kiam alvenis la falĉa tempo, la du fratoj ligis siajn faskojn kaj faris du egalajn amasojn, kiujn forlasis sur la kampo!

Dum la nokto, tiu el la du fratoj kiu restis fraŭlo, havis bonan penson: li diris al si mem: mia frato havas edzinon kaj gefilojn nutrotajn, kaj pro tio, ne estas juste ke mia parto estu tiel granda kiel lia. Nu! ni prenu el mia amaso kelkajn faskojn kaj al lia ni aldonu ilin sekrete; li tion ne ekrimarkos, kaj tiel li ne povos ilin rifuzi, kaj li agis kiel ĝin pensis. La saman nokton, la alia frato vekiĝis kaj diris al sia edzino: mia frato estas juna, li vivas izolite, havas nenium, kiu lin zorgu kaj konsolu je liaj laciĝoj; pro tio, ne estas juste ke ni prenu el la komunkampo tiom da faskoj kiom li. Ni leviĝu kaj alportu sekrete al lia amaso kelkajn faskojn; li tion ne ekrimarkos morgaŭ, kaj tiel li ne povos ilin rifuzi, kaj kiel ili ĝin pensis, ĝin faris.

La morgaŭan tagon, la du fratoj revenis en la kampon, kaj ili estis surpruzegitaj vidante ke la du amasoj restis egalaj; nek unu nek alia povis tiun ĉi miregindaĵon interne kompreni: ili agis same dum multaj sinsekvaj noktoj; sed kiel ĉiu el ili alportis al la amaso de sia frato egalan fasknombron, la du amasoj restadis ĉiam egalaj, ĝis kiam unu nokton, viglante por nur elserĉi la kaŭzon de tiu ĉi mistero, la du fratoj sin renkontis portante ĉiu la faskojn kiujn ili donacis al si reciproke.

Nu! la loko, kie tio okazis, devis plaĉi al Dio, kaj la homoj ĝin benis kaj elektis por tie starigi al Li templon.

El la franca lingvo tradukis FRANCISCO DOMINGO.



Sciigoj

Franĉujo.—En sia 6^a numero (Decembro 1905) «Tra la Mondo» komencis serion da internaciaj enketoj per demando pri la instruado en la tuta mondo. Kiel tio povas esti tre utila por la varbado de profesoroj kaj geinstruistoj al Esperanto, ni atentigas niajn legantojn kaj ilin instigas partopreni en tia enketo, ĉiu laŭpove, skribante aŭ ilustrante.

La distinginda raportonto, profesoro Th. Rousseau, doktoro de sciencoj, scios elĉerpi el la ricevitaj respondoj interesajn

Francio.—En su núm. 6 (Diciembre 1905) «Tra la Mondo» comenzó una serie de informaciones por medio de cuestionario sobre la instrucción en todo el mundo. Como esto puede ser muy útil para atraer profesores y maestros al Esperanto, llamamos la atención de nuestros lectores y les invitamos a tomar parte en dicha información, por escritos ó ilustraciones.

El distinguido profesor Th. Rousseau, doctor en ciencias, sabrá sacar de las contestaciones recibidas interesantes y

(1) Estas eble ke tiu ĉi legendo aŭ popola tradicio ne havu veran fundamenton: Biblio nur diras al ni ke la templo staris sur la monto Sion'o: la cetero estas fantaziaĵo.

kaj praktikajn konkludojn kaj starigi verkon indan de Esperanto.

Jus ni ricevas avizon pri grava pet-skribo farita de francaj deputitoj pri enkonduko de Esperanto en la programojn de instruado. Tio treege necesigas la sukceson de la enketo malfermita en «Tra la Mondo».

Tiuj dezirantaj ĝin partopreni ricevos senpage la demandaron. Oni petu la 6^{an} numeron de «Tra la Mondo». 15, boulevard des 2 Gares, Mendon (S. et O), France.

Anglujo.—Laŭ decido de la Londona Komercia Cambro oni akceptis la instruon de la lingvo internacia Esperanto en la eduka fako de tiu korporacio. La unuaj ekzamenoj okazos la 30^{an} de tiu ĉi monato.

Novaj grupoj fondiĝis en Grimsby, Goole, Newport, West Norwod kaj Pudsey.

Germanujo.—Grupoj fondiĝis en Mannheim, Leipzig kaj Frankfort.

Per la pero de la Frankfurta Grupo oni aranĝis publikan paroladon en Hanau. S-ro Peters, inĝeniero, parolis la 27^{an} de Marto tie pri Esperanto. Oni decidis fondi grupon. La 4^{an} de Aprilo fondiĝis kun 20 anoj. Ni tre dankas ilian saluton.

Svedujo.—Ni legas en nia kolego «Esperantisten» ke ĵus fondiĝis laborista grupo esperantista en Orkarstrom, kiu intencas disvastigi Esperanton inter laboristaro de granda fabriko okupanta 1.100 laboristojn kiuj parolas 16 diversajn lingvojn!

Ankaŭ fondiĝis grupoj en Stelleryd kaj en Ronneby.

Hispanujo.—Ni ricevis cirkuleron el Barcelono, kiu pravas la sukceson atingitajn de nia katalunaj kunbatalantoj. Ĝi anoncas la kreadon de la societo «Espero Kataluna», kiun ni gratulas kaj salutas kaj el kiu ni esperas grandvaloran helpon

prácticas conclusiones formando una obra digna del Esperanto.

Acabamos de recibir noticias sobre una importante petición hecha por algunos diputados franceses sobre la introducción del Esperanto en los programas de instrucción. Esto hace necesario el éxito de la información abierta en «Tra la Mondo».

Los que deseen tomar parte recibirán gratuitamente el cuestionario. Pídase el núm. 6 de «Tra la Mondo»: 15, boulevard de 2 Gares, Mendon (S. et O.), Francia.

Inglaterra.—Según acuerdo de la Cámara de Comercio de Londres se ha aceptado la enseñanza de la lengua internacional Esperanto en la sección de instrucción de dicha corporación. Los primeros exámenes se verificarán el 30 de este mes.

Se han fundado nuevos grupos en Grimsby, Goole, Newport, West Norwod y Pudsey.

Alemania.—Se han fundado los grupos de Mannheim, Leipzig y Frankfort.

Por mediación del grupo de Frankfort se organizó una conferencia pública en Hanau. El Sr. Peters, ingeniero, habló allí del Esperanto el 27 de Marzo. Se decidió fundar un grupo. El 4 de Abril se fundaba con 20 socios. Agradecemos su saludo.

Suecia.—Leemos en nuestro colega «Esperantisten» que acaba de fundarse un grupo obrero esperantista en Oskarsstrom, que intenta divulgar el Esperanto entre el personal de una gran fábrica que sostiene 1.100 operarios que hablan 16 diferentes idiomas!

También se han fundado grupos en Stelleryd y en Ronneby.

España.—Hemos recibido una circular de Barcelona que prueba el éxito alcanzado por nuestros compañeros catalanes. Anuncia la fundación de la sociedad «Espero Kataluna», á la que felicitamos y saludamos, esperando de ella pa-

por disvastigi Esperanton en Hispanujo. Ĝia Prezidanto estas S-ro Johano Rosals, strato Puertaferriŝa, 30, librovendejo, Barcelono.

Ni legis bonajn propagandajn artikolojn en la «Revista de Menorca» kaj en «El Mentor» de Chacabuco (R. Argentina) subskribitajn de S-roj José Juaneda kaj José M. Olivares.

Ankaŭ en «La Correspondencia de Valencia» publikigis nia karega amiko S-ro Román Ayza bonegan artikolon pri la ebleco de lingvo internacia; kaj en «La Verdad» de Murcia S-ro Ricardo Codorniu daŭrigas sian serion da propagandaj artikoloj.

«La Academia Calasancia», hispana revuo, eldonita en Barcelono alportis en malsamaj numeroj bonajn artikolojn pri Esperanto de P. Bruno Rodríguez kaj de S-ro Karolo Cardelus Carrera.

Dank'al la laborado de S-ro Kamilo Cela ĵus fondiĝis Esperantista grupo en *Foz* (Lugo). Prezidanto, S-ro Kamilo Cela; sekretario, S-ro Antono Villar Ponte; voĉdonantoj, S-roj Antono Noriega kaj Konstantino Vazquez.

Ni legas en la madrida revuo «Los Sucesos»:

«La anglaj kaj germanaj ĵurnaloj dediĉas grandajn laŭdojn al fraŭlino Tamara, «la rusa najtingalo», kies portretoj ni publikigas.

»La bela rusa knabino ravis kaj entuziasmigis la moskvan publikon, kiu en diversaj teatroj de Moskvo ĉvaciigis ŝin pro ŝiaj poeziaj kaj belegaj kantoj verkitaĵ en Esperanto.

»Estas la unua fojo, kiam oni kantas Esperante kaj kiel fraŭlino Tamara kantas tiel majstre, la spektaklo estas duoble alloga.

«La esperanta najtingalo» ekricevis proponojn el la precipaj entreprenistoj germanaj, anglaj, amerikaj kaj francaj. Eble post nelonge ni ankaŭ aplaŭdos ŝin en Hispanujo.»

tente ayuda para esparcir el Esperanto en España. Su presidente es D. Juan Rosals, calle Puertaferriŝa, 30, librería, Barcelona.

Hemos leído excelentes artículos de propaganda en la «Revista de Menorca» y en «El Mentor», de Chacabuco (R. Argentina), firmados por D. José Juaneda y D. José M. Olivares.

También en «La Correspondencia de Valencia» publicó nuestro querido amigo D. Román Ayza un largo artículo sobre la posibilidad de una lengua internacional; y en «La Verdad» de Murcia, don Ricardo Codorniu continúa su serie de artículos de propaganda.

«La Academia Calasancia», revista española que se publica en Barcelona, ha traído en diferentes números artículos en favor del Esperanto, escritos por el Padre Bruno Rodríguez y D. Carlos Cardelus Carrera.

Gracias á los trabajos del Sr. Camilo Cela se acaba de fundar un grupo esperantista en *Foz* (Lugo): Presidente, don Camilo Cela; secretario, D. Antonio Villar Ponte; vocales, D. Antonio Noriega y D. Constantino Vázquez.

Leemos en la revista madrileña «Los Sucesos»:

«Los periódicos ingleses y alemanes dedican grandes elogios á la señorita Tamara, «el ruiseñor ruso», cuyo retrato publicamos.

»La bella joven rusa arrebató y entusiasmó al público moscovita, que en diversos teatros de Moscou la ovacionaron por sus poéticos y hermosos cantos escritos en Esperanto.

»Es la primera vez que se canta en Esperanto, y como la señorita Tamara canta tan magistralmente, el espectáculo tiene doble atractivo.

«El ruiseñor del Esperanto» ha empezado á recibir proposiciones de los principales empresarios alemanes, ingleses, americanos y franceses. No hemos de tardar mucho, quizás, en aplaudirla en España.»

Bibliografio

Anatomia Vortaro kvarlingva: latina (Basel'a nomenklaturon), franca, angla kaj esperanta; verkita de la Medicina Esperantista Grupo.—Paris. Firmo Hachette kaj K.^o

Nenece estas rimarkigi al niaj legantoj la gravecon de tiu verko, ĉar pruvite ke Esperanto taŭgas por la ordinaraj bezonoj de nia vivo kaj kiel perilo por diskonigi literaturajn verkojn tradukitajn aŭ originalajn, spite de la skeptikuloj ni devas iom post iom utiligi nian helpan lingvon por la diversaj branĉoj de la homa saĝeco.

La Medicina Grupo akceptis, kiel plej bonan fundamenton de la esperanta terminologio la latinan nomenklaturon akceptitan de preskaŭ la duono de Eŭropo sub la nomo de «Basela nomenklaturon». Tiel, dank'al Esperanto, la anatomia lingvaĵo estas tute internaciigita kaj ĝi estos bona maniero elvidigi la servojn fareblajn de internacia lingvo.

«Anatomia Vortaro» estas verko tre utila ne nur por tiuj okupantaj sin pri Medicino, sed por ĉiuj esperantistoj, kiuj trovas en ĝi vortojn ĝis nun netroveblajn en niaj ordinaraj vortaroj.

Tutkoran gratulon de la fervoraj samideanoj meritas la Medicina Grupo, kiu tiel bone sciis elekti la ebenan vojon por alveni en la deziritan celon.

Elementa Fotografata Optiko: originale verkita en Esperanto de Karlo-Verks.—Parizo. Presa Esperantista Societo. Prezo: 1'25 frankoj.

Jen alia grava verketo. Ĝia celo estas konigi al la fotografaj amatoroj, kio estas objektivo, kaj kiel oni devas profiti ĝiajn kvalitojn. Ne enirante por tio en la malfacilajn teoriojn de la supera Optiko, ĝi tamen prezentas plenan kaj facilan teorion de la optikaj fenomenoj de la lumaj radioj trapasantaj lensojn, kaj ankaŭ ĝi enhavas praktikajn formulojn diversajn kaj konsilojn por la klarigo kaj elekto de bonaj objektivoj.

La Tutmonda Lernolibro por paroligi Esperanton: originale verkita de F. L. G. Maréchal.—12, Eldon Place. Leeds (Anglujo). Prezo: 1 franko (neafrankite).

Ĝi proponas metodon per lecionaro por ekparoli aŭ ekparoligi Esperanton. Ĉiu leciono konsistas el frazoj priskribantaj agojn fareblajn por la instruisto aŭ lernantoj kaj tiamaniere oni *ludas*, skribas kaj legas la lecionon, kaj poste la instruisto klarigas la uzon de prefiksoj, sufiksoj, finiĝoj kaj ceterajn punktojn gramatikajn.

Tiu verketo estas utiligebla en niaj grupaj kunvenoj por fari mallongan konversacian ekzercon; sed precipe oni uzos ĝin en la kursoj de Esperanto, kie ĝi taŭgos kiel fruktodonan ekzercaron.

Homaranismo (Hilelismo).—Ni ricevis tiun broŝureton tre lerte verkitan en nia helpa lingvo.

La Serĉado por la Ora Saflano, de Nathaniel Havothorne, tradukita esperanten de J. C. O'Connor, Ph. Dr., M. A., kaj C. F. Hayes; ilustrita de Brinsley le Fanu.—W. T. Stead's, 39 Whitefriars Street. London. E. C. Prezo: 6 pencoj.

Tiu beleta romano, priskribanta la aventurojn de la kuraĝa Jasono estas leginda. Pri ĝia korekta esperanta stilo ne estas necesa paroli, tial ke malgraŭ la kompetenteco de la tradukintoj, ankaŭ tra legis la presprovaĵojn kleraj kaj diverslandaj esperantistoj; tiel oni ne povas dubi pri ĝia internacieco.

Cindrulino: esperantigita de L. Milho. Librejo A. Barbot, 15, rue Etienne-Pallu, Tours (Tur) France. Prezo: 50 centimoj.

Ĝi estas la n^o 2 el la «Ilustrita Biblioteko por infanoj» eldonita de nia kunfrato «Espero Katolika».

Cindrulino! Kiu ne legis aŭ aŭskultis tiun beletan kaj moralan rakonteton en la unuaj jaroj de sia vivo? Vere nia infaneco jam estas pli-malpli malproksima, sed la rakonteto vekas en ni dormantajn rememorojn... Ĉiu el ni, laŭsekse, certe deziris esti aŭ la princo edziĝe premianta la bonkorecon kaj afablecon de tiu malfeliĉulino aŭ *Cindrulino*, kiu fine atingis la merititan rekompencan.

Dank'al «Espero Katolika», kiu tiel taŭge elektas verketojn por sia Infana Biblioteko, *Cindrulino* atingis alian ankaŭ merititan rekompencan: t. e. lokon en nia internacia biblioteko.

R. Duyos.

La ĥino kiu reiris al sia patrujo

(Historieto de ĥinaj moroj)

En San Francisco de California loĝis ĉirkaŭ sesdekjara advokato, tiel riĉa en talento kiel en materiaj bienoj. En sia fraŭla hejmo, li de dekkvin jaroj havis ĥinan serviston nomitan Sam (Samuelo). La servisto tiel bone estis akirinta l' arton diveni eĉ la plej malgrandajn dezirojn de sia mastro, ke li neniam bezonis instrukciojn. Kiam la mastro intencis inviti gastojn — ĉu unu, ĉu cent — li nun elmontris la nombron, kaj Sam efike zorgis pri la cetero. Li kune estis kuiristo, ĉambristo, gardinto kaj amiko. Neniam prosperis penetri en la domon ia enuiga vizito, kiam la mastro deziris esti tutsola por ripozi.

Ĉiumatene l' advokato vekigis sub la sonoj de muzikkesteto kunigita kun vekaparato, kiun Sam ĉiam antaŭe aranĝis por funkciadi je la sepa horo akurate. Jam la bano estis preta. Sur la tabulo kuŝis ĉemizo pura, havanta la butonojn jam ordigitajn. De ia seĝo pendis la vestoj, kiuj al la mastro ĝuste konvenis, dum sur la planko staris, brila kiel spegulo, la deca paro da ŝuoj. Sur la kameno troviĝis, ankoraŭ malseka per nokta roso, ia rozburĝono, difinita por butontruo de la ĵako, kaj fine en la manĝoĉambro atendis varmega kaj bongusta matenmanĝo.

Poste, kiam la mastro pretiĝis foriri al sia oficejo, Sam, silenta kiel ombro, staris en la vestiblo, tenante en mano superveston, ĉapelon kaj bastonon. Kiam la vetero ŝajnis malfavora, pluvombelo anstataŭis la bastonon. La pordo malfermiĝis, la mastro eliris la straton. Kaj nokte kiam la mastro revenis hejmen, tuj ĉe lia alproksimiĝo la pordo, kvazaŭ per ensorĉo, larĝe remalfermiĝis.

Sam neniam petis permeson, ĝui kelkan libertempon. Kiam lia apudesto estis necesa, li neniam mankis. Ĉe la kontraŭa okazo, li ĉiam diskretege malaperis. Mastro kaj servisto tiel perfekte akordiĝis, ke ofte dum tutaj semajnoj nenian vorton ili parolis unu al alia. Se la advokato sentadis pli kaj pli inklinon al ĥino kaj donis al li monatan salajron po cent dolaroj, plie serĉate ĉiujn eblajn okazojn, pruvi sian dankecon, Sam nenion volis akcepti ne eĉ dankon. Kontentigis lin la privilegio, servi sian mastron. Sed unu matenon, kiam li servis la kafon ĉe la matenmanĝo, Sam, kies flava vizaĝo ne malkaŝis eĉ la plej malgrandan kortuŝecon, tute trankvile ekkriis: «la venontan semajnon mi forlasi Sinjoron; mi serĉi por li pli bonan homon».

Formovinta el siaj lipoj la tason da kafo kaj atente rigardante lin, l' advokato

konvinkigis, ke la blankvestita servisto tre serioze estis parolinta.—«Tiel vi volas min forlasi? Ĉu mi ne vin sufiĉe rekompencas, he? Ne estu malsaĝu, Sam, mi plimultigos vian salajron ĝis centkvindek dolaroj, kaj ni ne disputu plu!»—«La venontan semajnon mi forlasi Sinjoron, mi reiri al Ĥinujo», ripetis, neŝanĝeble, la servisto.—«Ha! mi nun komprenas. Vi volas edziĝi. Tre bone, alkonduku sin tien ĉi. Ne mankas sufiĉa laboro al du personoj, kaj en ĉiu okazo tiu ĉi domo estas iom malgaja. Hodiaŭ mem, mi faros viziton al la havenestro kaj mi aranĝos viajn vojaĝdokumentojn.» «La venontan semajnon mi foriri al Ĥinujo, mi ne bezoni dokumentojn, mi jam neniam reveni», diris, per incite trankvila kaj persista maniero, la servisto.—«Nu! mi solenege ĵuras, ke vi ne foriros», ekkriis l' advokato.»—«Kaj mi solenege ĵuri la kontraŭon», respondis la servisto, kiu la unuan fojon kuraĝis uzi esprimon tiel nekunigeblan kun la kutima respekto.

L' advokato mallonge pripensis kaj tiam diris: «Aŭskultu, Sam, kaj pardonu mian ekkoleron. Mi bone scias, ke vi ne estas sklavo, sed diru al mi, kion mi faris, por ke vi volu min forlasi, sciante kiom mi vin bezonas?»—«Se mi ĝin diri, sinjoro mokos min?»—«Ne, mi ne mokos vin»—«Certe, sinjoro mokos min?»—«Estu trankvila, mi tute ne tion faros.»—«Nu! mi foriri al Ĥinujo, tie morti?»—«Kia sensencaĵo! vi same tiel bone povas morti tie ĉi. Ĉu ni ne interkonsentis, jam ĉe la komenco, ke se vi mortas antaŭ ol mi, mi ekspedos vian korpon al via patrujo?»—«Mi morti post kvar semajnoj kaj du tagoj?»—«Kion vi diras?»—«Mia frato, li en la malliberejo. Li, dudeksesjara; mi, kvindekjara. Li havi edzinon kaj infanon. En Ĥinujo, mortkondamniton oni leĝe povas anstataŭi per kiu ajn el la sama familio. Mi foriri al Ĥinujo, mi doni mian monon al mia frato. Li, vivi; mi morti.

La morgaŭan tagon, alia nino prezentis sin ĉe l' advokato. Post unu semajno, la nova servisto ĉion sciis kaj nenion sciis, same kiel lia antaŭulo. Sam malaperis, ne dirinte adiaŭ. Li returnen iris al Ĥinujo, kie oni lin senkapigis kvar semajnojn kaj du tagojn post la dato, en kiu li estis sciiginta al la mastro sian decidon. La fraton oni liberigis. Kaj ĉe l' advokato, ĉio funkciadas pli aŭ malpli kiel kutime, krom kelkafoje kiam la mastro alvokas «Sam», anstataŭ diri Johano. Kaj tiam li eksentas ion kiel korsubpremon, sed li nenion diras.

El la Marta numero de angla jurnalo «The Idler» esperantigis,

GEORGO NORMAN.

Spritaĵoj

—Kiu estas la plej akirinda besto?

—La kato.

—Kiel? mi petas,

—Tre facile! Sufiĉas havi du el tiuj bestoj por ekstreme riĉiĝi, t. e., por ĉiam posedi dukatojn!

—Ĉu vi estas kristano?

—Tute ne! Mi estas ateisto, *dank' al Dio.*

NOVAJ ANOJ DE H. S. P. P. E.

462, José de Barrio, Sax (Alicante).—464, Celestino Escobés, Calahorra (Logroño).—464, R. V. R., Aubin Tours (Indre-et-Loire, Francia).—465, Enrique Lisbona, Murcia.—466, Antonio Villar Ponte, Foz (Lugo).—467, Antonio Noriega, Foz.—468, Constantino Vázquez, Foz.—469, Manuel Membrillera, Ceuta.—470, Antonio Montesinos Cabrelles, Burjasot (Valencia).

Korespondada fakoj de "La Suno Hispana,"

SINJOROJ:

R. R., Coruña.—G. E., Dresde.—J. P., Madrid.—R. A. C., Oviedo.—J. D. de V., Oviedo.—C. P., Maçon (Francujo).—J. L., Vesoul (Francujo).—C. de C., Foz.—J. B., Gracia.—Fr. M. Y., Sevilla.—A. A. R., Voroney (Rusujo).—A. M., Santa Rosa (Méjico).—Fr. E. D., Lille (Francujo).—M. A., Varsovia (Rusujo).—S. E., Habarovsk (Rusujo).—J. M. D., Reus.—H. W., Hkley (Anglujo).—R. de P., La Bisbal.—J. F. H., Consuegra.—J. G., Barcelona.—J. W. E., Brixton (Anglujo).—C. E., Calahorra.

Kore salutas Vin,

A. J. L.

NIAJ VIZITANTOJ

N.º 31, 32.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, Lima (Peruo). Jarabono, 3 fr.
 Jan. Feb. Marto 1906.—**Centrameriko Esperantista.** 8.^a Avenida Sur, 11, Cantón. Libertad. Prezo, 0'12 § ekzemplero.
 24 Dec 1905.—**El Dominical.** Marron a cuji, 43, Alto Caracas (Venezuela). Jarabono, 6 pesetoj.
 N.º 19.—**Esperanto.** R. P., Central, Genevo (Svislando). 24 numeroj sinsekvaj, 3 fr.
 N.ºj 1, 2, 3 kaj 4.—**Esperanto.** Falta (Rusujo). Jarabono, 8 fr.
 Jan. 1906.—**Esperanto.** Papnovelde-Utca, 6, Budapeŝt, 4. Hungarujo. Jarabono, 3 frankoj.
 N.º 2, 1906.—**Esperanto.** S-ro N. D. Kovačev, Sofia (Bulgarujo). 24 numeroj sinsekvaj, 4 fr.
 Mart. 1906.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde près Tours (Indre et-Loire, Francujo). Jarabono, Francujo, 4 fr.; alilando, 5 fr.

- N.º 7-8.—**Espero Pacifista**. 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (Francujo). Jarabono, 5 fr.
- N.º 3.—**Esperantisten**. 37, Surbrunnsgatan. *Stockholm* (Svedujo), Jarabono, 3'50 frankoj.
- N.º 10, 11 kaj 12.—**El Mundo Ilustrado**. Aguila, 60, *Habana*. Numero 10 ctoj. 1, 2 kaj 3.
- Marto 1906.—**Germana Esperantisto**. Prinzentrasse, 95, *Berlin S.* (Germanujo). Jarabono 3 markoj.
- N.º 2.—**Internacia Revuo Medicina**. 33, rue Lacépède. *Paris*. Jarabono, 12 fr.
- N.º 6, 7, II jaro.—**La Algeria Stelo**. 57, rue d'Isly, *Alger* (Alĝerujo). Jarabono, 3 fr.
- N.º 44.—**La Belga Sonorilo**. S-ro J. Coox, *Duffel*, (Belgujo). Jarabono, 4 fr.
- N.º 118.—**La Revue de l'Esperanto**, 26, rue Wissoq, *Boulogne-sur-Mer* (Francujo). Prezo, 0'10 fr. ekzemplero.
- N.º 4.—**La Esperanta Studento**. 16. Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex. England. Jarabono, 2 fr.
- N.º 6 kaj 7.—**Lingvo Internacia**. 33, rue Lacepède. *Paris*. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.
- N.º 114, 115, 116, 117.—**Murcia**. Sociedad, 14, Murcia. Jarabono, 6 pesetoj.
- N.º 140, 141.—**Museo Exposición**. Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.
- N.º 1, 2 kaj 3.—**Revista de Menorca**. Ateneo científico. *Mahón*. Jarabono, 6 fr.
- N.º 3.—**Ruslanda Esperantisto**. S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24 (Rusujo). Unu numero 30 kopekojn.
- N.º 3.—**Svisa Espero**. 6, vieux College, *Genève* (Svisujo) Jarabono, 2,50 frankoj.
- N.º 16.—**The British Esperantist**. unuigita kun **The Esperantist**. 13, Arundel street, Strand. W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 fr. Kun aldono literatura, 4 frankoj.
- N.º 9.—**Tra la Mondo**. 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon* (S. et O.) (Francujo) Jarabono, 8 fr.
- N.º 4.—**Unua Paŝo**. San Stefano, 26, Sofia, (Bulgarujo). Jarabono, 3 fr.

Tipografía Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

ANONCOJ

S-ro Georges Okonneff—Ruffic. Charcoff. G. Pétinskaya (Rusujo).—Deziras korespondadi kun hispanaj esperantistoj pri la demandoj de la nuntempa politika vivo kaj literaturo.

Gazeto «**ESPERANTO**» estas nun la posedaĵo de akcia Societo, kiu ĝin eldonas regule kaj senhalte. Abonkosto: Franc kaj Svislando, 3 fr.; aliaj landoj, 3'75.

S-ro Karlo Bruneteaux, Stenografisto, 78, rue Marcadet, Paris, deziras korespondi kun hispanaj esperantistoj kaj ŝanĝi poŝtmarkojn.

S-ro M. G. Guenser. Ecole Normale de Tir. Camp de Chalons Morne (France), deziras korespondi poŝtkarte kaj ŝanĝi poŝtmarkojn.

S-ro A. Avril. 3, Impasse des Carmelites, Lyon, deziras korespondi kun hispanaj esperantistoj.